

# Informilo de Septembro 2015

Numero 18, Septembro 2015

## La 100-a Universala Kongreso de Esperanto akceptis rezolucion direktitan al Unesko

Kunlige kun la sukcesa finiĝo de la jubilea 100-a Universala Kongreso, la kongreso akceptis rezolucion direktitan samtempe al Unesko, kun kiu Universala Esperanto-Asocio jam kunlaboras 60 jarojn, kaj al la landaj Esperanto-asocioj kaj la membraro de UEA – kaj ankaŭ al la Esperanto-publiko ĝenerale. La rezolucio instigas al dialogado inter la kulturoj en spirito de reciproka kompreno, atentigante, ke Esperanto estas ideala perilo de tia egaleca komunikado. La teksto de la rezolucio sekvas:

### REZOLUCIO DE LA 100-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Lillo, Francio, la 1-an de aŭgusto, 2015

**La 2 695 partoprenantoj en la 100-a Universala Kongreso de Esperanto,**  
kunveninte el 80 landoj, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015, en Lillo, Francio,

diskutinte la temon “Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj” en sep diversaj sesioj tra la kongresa semajno,

volante kontribui al la disvolviĝo de la Internacia Jardeko por la Alproksimiĝo de Kulturoj proklamita de Unesko,

- **konstatas**, ke interkultura dialogo estas same urĝe necesa hodiaŭ, kiel ĝi estis antaŭ 110 jaroj, kiam okazis la unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo-che-Maró;
- **asertas**, ke por vere interkomprenigi la homojn, tiu dialogo devas esti afero ne nur de la cerbo sed ankaŭ de la koro, kunplektanta klerigon kaj kundiskutadon, arton kaj amikecon;
- **atentigas**, ke ĝuste tian multflankan interkulturan dialogon praktikas kaj disvolvas la tutmonda Esperanto-movado en siaj centoj da kongresoj kaj renkontiĝoj ĉiujare;
- **instigas** ĉiujn aliajn aktivulojn kaj movadojn por interkultura dialogo doni pli da atento al la lingva dimensio de sia laboro, kaj al la reala funkciado de Esperanto kiel lingvo inkluziva kaj egaleca, kies uzado povas plifaciligi kaj pliprofundigi tian dialogon;
- **ree** dediĉas sin al la kultivado kaj disvastigado de la valoroj de reciproka respekto, paco kaj justeco inter ĉiuj homoj, konforme al la celoj de Unesko kaj kunlige kun la aktualaj streboj de Unuiĝintaj Nacioj por konstrui daŭripovan mondan socion.

Anglalingva traduko de la rezolucio estas troveblas ĉe [www.esperanto-un.org](http://www.esperanto-un.org) (vidu sub Newsletters). Vi estas petata sendi ĝin al via landa Unesko-Komisiono, Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj, aŭ aliaj eventuale interesataj neesperantistoj kaj neesperantistaj organizaĵoj.

## Simpozio retrorigardis al Esperanto kaj Unesko

**1 aŭgusto.** La pasintaj kvardek jaroj de kunlaboro kun Unesko estis festataj en speciala kunveno dum la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lillo, Francio, lundon la 27-an de julio. La ekonomiisto Barbara Despines, ano de la laborgrupo pri Unesko starigita en 1974-75, omaĝis al la seso da teamanoj kiu altiris la atenton de Unesko-gvidantoj kaj ebligis engaĝiĝon en la klopodoj krei Novan Internacian Informan kaj Komunan Ordono. Tiuj agoj kondukis al vizito al la Universala Kongreso de Esperanto en 1977 fare de la Ĝenerala Direktoro de Unesko Amadou-Mahtar M'Bow en 1977, kaj la enmeto de almenaŭ aludo al lingva neegaleco en la Raporton MacBride de 1980, kiu pritraktis la misproporciojn en la fluo de informoj inter evoluintaj kaj evoluantaj landoj. Kiel atentigis Humphrey Tonkin, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio tiutempe kaj nun reprezentanto de la Asocio ĉe UN Novjorko, la ideo de nova rilato inter la Tria kaj Unua Mondo ne efektiviĝis laŭ la maniero antaŭvidata de MacBride, nek oni donis al la lingva demando la atenton, kiun ĝi meritis; tamen rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1985 rekonis la gravecon de Esperanto por internacia interkompreniĝo kaj alvokis al membroŝtatoj kunhelpi en festado de la 100-a jubileo de la lingvo.

Aliaj parolantoj en la aranĝo estis, inter aliaj, Probal Dasgupta, eksprezidanto de la Asocio, kiu tiam laboris kiel helpanto en la oficejo de UEA en Novjorko, Renée Triolle, nuna reprezentanto de la Asocio ĉe Unesko, kaj Stefano Keller, kiu reprezentas la Asocion en Ĝenevo kaj rolas kiel estrarano pri eksteraj rilatoj de la Asocio. La sesion prezidis Mark Fettes, nuna prezidanto de la Asocio.

La kunsido liveris bonan okazon por priskribi al kongresanoj la nunan engaĝon de la Asocio kun la programoj de UN kaj Unesko kaj ĝian subtenon de UN kaj Unesko en tiuj agadoj.

*Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:*

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

[www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org)

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041